

NORDA ★ KURIERO

La Federacio elektis sian novan nomon!



Sabaton la 16^{an} de junio 2018 okazis la jarkunveno de la Nordfrancia Esperanto-Federacio en Lillo laŭ invito de la Lilla klubo. Prezidanto Michel Dechy kaj sekretario Katja Boen raportis pri la agado de la Federacio kaj la kluboj dum la jaro 2017. Poste kasisto Daniel Calvos prezentis la financon raporton. Michel Dechy deziras, ke la enkasa mono utilu por belaj projektoj de nia loka movado. Ĉiuj raportoj estis aprobitaj unuanime.

Jean-Claude Roy anoncis, nome de sia klubo Espéranto 80, ke la urbo Salouël inaŭguros novan ZEO-n en la 6^a de oktobro 2018: aleon Espéranto inter universitato kaj superbazaro bordere de la urbo Amieno. Arlette Plutniak informis, ke la Arasa



klubo festos sian 25-jariĝon per la organizo de lingva festivalo kaj de koncerto de JoMo la 30^{an} de septembro 2018 en Araso. Ambaŭ projektoj ricevos monhelpon de la Federacio.

La lasta parto de la jarkunveno temis pri modifo de la federacia statuto. Tio rezultis de la decido de la Federacia Komitato (vd. *Nordan Kurieron* n^{ro} 8). Krom ĝisdatigo de diversaj klaŭzoj, tiu modifo celis renomigi la Federacion kaj aligi ĝin al la interasocia kotizosistemo de la landa asocio.

Unuanime la ĉeestantaro aprobis novan nomon, kiu kongruas kun tiu de la nova regiono kreita en 2016 (anstataŭ Nord-Pas-de-Calais kaj Picardie):

Espéranto Hauts-de-France!

Tamen la Esperanta nomo restos sama: Nordfrancia Esperanto-Federacio.

Fine, ankaŭ unuanime estis aprobita la aligo de la Federacio kaj ĝiaj membraj kluboj al la interasocia kotizosistemo de Espéranto-France. Konkrete, de post ĉi tiu somero vi membroj per ununura kotizo en la tri asocioj: loka klubo, regiona federacio kaj landa asocio. La membriĝilojn kaj kotizojn kolektos Espéranto-France, kiu resendos al la Federacio kaj kluboj la kotizojn, nomojn kaj adresojn de la kotizintojn.

Ĝi al la jubilea lingvofestivalo Arasa!

Nia asocio Arras-Espéranto, kun la Nordfrancia Esperanto-Federacio, lingve celebros sian jubilean 25-jariĝon per lingvofestivalo, kiu okazos en Araso **dimanĉon la 30^{an} de septembro!**

Ni kore invitas kaj bonvenigos vin ekde la 10:00 en la tute nova *Office culturel en Pôle culturel Saint-Pierre* en Araso (6 rue de la Douizième). Vi povos parki vian veturilon en la senpaga, tute proksima parkejo t.n. *Parking du Crinchon*.

Ĉiuhore estos prezentataj 5 diversaj lingvoj en 5 salonoj ĝis la 13:00. Poste vi mem laŭplaĉe organizos vian tagmanĝon dum la unuhora paŭzo (estas multaj diversprezaj restoracioj en la ĉirkaŭaĵo). Je la 14:00 rekomenciĝos la prezento de novaj lingvoj en la 5 salonoj ĝis la 17:00.

Dum la tuta tago eblos viziti surloke 3 belajn ekspoziciojn kaj aĉeti Esperanto-librojn en la impona libroservo de FEL organizata de niaj belgaj samideanoj Katja kaj Hans. Vi povas antaŭmendi viajn deziratajn librojn ekde la 1^a de septembro retmesaĝe al: lodorkatja@skynet.be

Koncerto de JOMO komenciĝos je la 18:00 en la tre bela historia kapeleto de la apuda Muzika Konservatorio. La nombro de la seĝoj estas limigita al 90. Do aĉetu tuj vian biletan (10 eŭroj)! Tiucele retroŝtu al: edmond.plutniak@free.fr



✍ La klubanoj de **Arras Espéranto**

Nova ZEO apud Amieno inaŭguriĝos

Sabaton la 6^{an} de oktobro je la 10:30 la klubo Espéranto 80 inaŭguros novan Zamenhof-Esperanto



-Objekton (ZEO), nome:

Allée de l'Espéranto (aleo Esperanto)!

Kie? En la urbo Salouël apud Amieno, supre de la avenuo Albert-Camus, fronte al la superbazaro E.Leclerc. Ceremonios ankaŭ la magistrato.

Ju pli multnombraj ni estos, des pli bone! Por bona organizado de tiu eksterordinara evento, bonvolu anonci vian ĉeston al Jean-Claude Roy per retmesaĝo: jean-claude.roy6@orange.fr, aŭ per telefono: +33 (0) 6 08 93 57 02.

Esperanto foiris inter la lillaj asocioj

La Lilla klubo oficiale sidas en Villeneuve-d'Ascq (apud Lillo) kaj ĉiujare partoprenas en la tiea asocia foiro. Sed konsekvence ĝis nun ĝi ne povis deĵori en la asocia foiro de Lillo. Tamen, ĉi-jare Esperanto-budo fine aperis en la Lilla foiro la 2^{an} de junio en la palaco Rameau!

Pluraj esperantistoj informis la publikon pri la lingvo kaj la kursoj proponataj en Lillo. La Lilla foiro ne akceptis tiom multajn vizitantojn, sed tiu unuafoja partopreno de la klubo estas sendube bona paŝo en la asocia medio de Lillo.



Amienanoj kongresis en Maroko

Tri amienaj klubanoj, Edwige, Houcine kaj Jean-Claude, partoprenis la kongreson MONA ĉe Marakeŝo (Maroko). MONA signifas: MezOrienta kaj NordAfrika kongreso. De la 31^a de marto ĝis la 6^a de aprilo tiu kongreso okazis apud la urbo Marakeŝo, en tre bela granda vilao nomata Villa Janna (*Janna* signifas *paradizo!*).

Partoprenis 45 homoj el 17 landoj. La prelegantoj parolis ĉefe pri transkultureco inter Francio, Hispanio, Norda Afriko kaj diversaj pli sudaj landoj ĝis Malio kaj Senegal.

Sed la plej grava informo kaj plezuro estis la fakto, ke junaj marokanoj partoprenis kaj estas komen-cantoj aŭ progresantoj.



La venonta MONA kongreso okazos en Teherano en aprilo 2019. ✍ Jean-Claude Roy

Lillanoj rendezuis por kartludi



Post unua luda vespero en februaro, la junaj lillaj esperantistoj rendezuis denove en la lilla trinkejo Speak Easy la 30^{an} de majo por amuziĝi kaj ludi Esperante! Trinkis, ludis kaj ridis Vincent, Joël, Katja, Dorine (ĉi-dekste videblaj, de maldekstro al dekstro) kaj Xavier. Ili precipe ludis maniljon (france: *manille*), kiu en Francio estis tre populara kartludo ĝis la mezo de la 20^a jarcento. Baldaŭ post la somera libertempo reokazos tia rendezuo: informiĝu per la Facebook-paĝo de la Lilla klubo!

Eo8O₂: kio estas?!



Ĉu nova elemento de la t.n. perioda tabelo? Tute ne! Ŝerco! Tamen, karaj legantoj, ĉu vi jam vidis la tre interesan “unuan fundamentan tabelon” pri esperantaj strukturaj elementoj? Mi rekomendas ĝin uzi.

Eo8O₂ estas bela molekulo. Krom kelkajn amikajn liberajn elektronojn, ĝi havas du atomojn: tiel ĝi nomiĝas Eo8O₂, kiel H₂ aŭ O₂ ekzemple. Tio ankaŭ signifas, ke tiuj du atomoj egalas, kvankam unu el tiuj du atomoj estas pli ina ol la alia... Sed inoj = viroj... ĉefe kiam okazas la tago de la virinoj la 8^{an} de marto!

Post tiuj neklaraj (mi konfesas) klarigoj, mi malkaŝas la signifon de tiu siglo Eo8O₂... Sed certe vi jam divenis, karaj legantoj! Temas pri nia loka departementa asocio Esperanto 80 kaj ties “scienca” siglo Eo8O... ĉar fakte sen iu ajn specifa volo, Eo8O enhavas du “atomojn” (du subgrupojn).

Kiel funkcias tiuj du subgrupoj? Bone, dankon!

Ambaŭ subgrupoj kunvenas hazarde ĉiun mardon posttagmeze. Kelkfoje estas telefona ligilo inter tiuj du, kaj tiamaniere ni interŝanĝas ideojn, proponojn, decidojn.

Kaj alia komuna trajto: ni plezure laboras! Komuna masohista trajto!

Unu subgrupo ĉefe laboras babilante, tradukante, aŭ ambaŭ, kaj la temoj estas tre diversaj : ĝardeno, literaturo, vojaĝoj, renkontiĝoj, teatraĵoj, filmoj ktp. Ekzemple Dominique omaĝis al France Gall, Françoise parolis pri la filmo *Maria by Callas* kaj pri teatraĵo, Henri rakontis sian vojaĝon en Portugalio ktp. Kaj ni forte ridas! Kelkaj estas tre asiduaj kaj petolemaj ;-)

La dua subgrupo laboras ĉefe pri kreado de libretoj. Ili mem kreis libreton pri apudmara Pikardio kaj pri pikardaj bongustaj receptoj (nuntempe kreata). Kaj plie ili laboras per hazardaj vortoj el la vortaro. Lastatempe ili cerbumis pri du specifaj vortoj: *oranĝo* kaj *haringo*!! La celo estas per vorto imagi, fantazii, kaj poste ĉiu skribas sian propran tekston pri ĉiu vorto: kion ĉiu vorto elvokas.

Alia komuna afero pri tiuj du subgrupoj: ili kunvenas unufoje monate, la unuan mardon de ĉiu monato, kaj tiamaniere la du atomoj kuniĝas kaj la molekulo pli bone funkcias. Ĉiuj elektronoj forte brakumas unu la alian, kaj tiele la rilatoj plifirmiĝas.

Lastatempe ni kunvenis kaj jen la fotoj de la grupo, krom mi la fotanto kaj skribanto.

✍ **Jean-Claude Roy**



Promenado tra la Flandraj Ardenoj



Nia kutima renkonto kun la flandraj asocioj efektiviĝis en la urbeto Ename, apud Oudenaarde, ĉe la orienta bordo de la rivero Skeldo. Ename longe estis la ĉefurbo de la regiono: Skeldo ankoraŭ estis, ĉirkaŭ la jaro 1000, limo inter la German-Romia Imperio kaj la Franca Reĝlando; kaj, fine de la 10^a jarcento, imperiestro Otono la unua konstruigis fortikaĵon en Ename por protekti sian Imperion kontraŭ la graflando Flandrio ankoraŭ dependanta de Francio.

La mateno estis dediĉata al la vizito de la preĝejo Sankta-Laŭrentio (*Sint-Laurentius*), sekvata de promenado en la apuda arbaro de Ename (*Bos t'Ename*). La preĝejo Sankta-Laŭrentio estas unu el la plej bone konservataj preĝejoj laŭ Otona stilo kaj datiĝas de la fino de la 10^a jarcento.

La promenado en la arbaro de Ename ebligis nin, tra kavaj vojoj, kutimiĝi al novaj teĥnikoj de arbo-kultivado, sed ankaŭ vidi malnovajn montetojn por kuniklobredado (*garenne*), jam uzitajn en Mezepoko.

Post komuna tagmanĝo en loka kafejo, ni pasigis la posttagmezon vizitante la ruinaĵojn de la malnova abatejo de Ename, detruita dum la Franca Revolucio,

sed kies subkonstruaĵoj ankoraŭ videblas. Dume nia ĉiĉeronino sciigis nin pri vivado en la monaĥejo en Mezepoko.

La tago finiĝis ĉirkaŭ la 17:00 per adiaŭa trinkado.

✍ Daniel Mayeux



Bela Printempa Semajno en Plauen

Kiel ĉiujare okazis Printempa Semajno Internacia (PSI) je Pasko en nova nekonata urbo. Ĉi-foje ni iris al Plauen en la eksa GDR (Orienta Germanio), ne for de la ĉeka landlimo.

Plauen brilis dum la komenco de la 19^a jarcento dank' al teksa industrio. Tie oni printis desegnaĵojn sur ŝtofoj, kaj vendis ilin en la tuta lando. Hodiaŭ la kvartalo apud la rivereto montras multajn spurojn de tiu epoko.



Poste la teksindustrio malaperis, la GDR ne renovigis, la urbo multe malkreskis, nur la duono de loĝantoj daŭre loĝis tie, pli-malpli 60 000.

De tiu fama epoko restas diversaj tre tipaj, grandaj domoj.

Ni loĝis en la junulargastejo, antaŭa fajrobrigada domo, kiu estas ornamita de murpentraĵoj kaj de diversaj elementoj ligitaj al fajrobrigado: glitstango, fajroestinga ekipaĵo, kiun oni surmetis dum la kostuma balo, fajrobrigada veturilo kaj muzeo. Estis amuza, simpata etoso!

Krom ĉiuj kutimaj programpartoj por infanoj, plenkreskuloj (Esperanto-kursoj, proponoj pri muziko, sporto, danco, manlaboro, prelego, ktp.), ni ekskursis, migradis al granda fervoja brikponto, la plej granda en la mondo.



Aparte interese okazis nokta gvidado tra la historio de Plauen ekde pluraj jarcentoj, interalie pri la unua manifestacio kontraŭ la GDR-reĝimo en 1989. La gvidanto estis tiea loĝanto, aktoro, kiu brile sukcesis interesegi la grupon per siaj konoj kaj sia humoro. La vespero kun li vere tre agrablis.

Pli ol 100 partoprenantoj ĝuis la restadon. El ili multaj novuloj venis de Berlino aŭ aliaj urboj de tiu regiono kaj malkovris unuafoje PSI, kiu okazis ne tro for de ili.

Venontjare PSI denove staros proksime al Francio, ne tre for de Sarbruko.

Ni revidos nin tie, ni atendos vin...

✍ Anne Dupéchaud

Inter la Verdaj Skoltoj

Saluton! Mi estas Marylou, unu verda skoltino.

La Verdaj Skoltoj estas unu tramo de esperantistaj skoltoj, kiuj venas de ĉie en la mondo.

Ni malkovrigas la Esperantan lingvon al ĉiuj en kongresoj kaj festivalojn (kiel La Semo), kaj ni organizas renkontiĝojn kun aliaj esperantistoj (kiel PEKO). Ni ankaŭ partoprenas en multaj esperantistaj eventoj (IJK, JES, ktp.).

Ni ĉiam vojaĝas, ĉar ni ne vivas en samaj landoj; do ni malkovras novajn landojn kaj urbojn.

Danke al nia ĉefo Lupo (Valère) kaj aliaj plenkreskuloj, kiuj helpas nin, ni travivas neforges-eblajn spertojn. Kaj ni progresas en Esperanto!

Pli da informoj vi trovos en nia retejo:

<https://verdajskoltoj.wordpress.com>

✍ Marylou **Madej-Arjallies**



Poemo de Ibn Arabi

La 27^{an} de februaro 2018 Edwige, Houcine, Henri kaj Jean-Claude tradukis poemon de la sufia filozofa Ibn Arabi el la araba kaj el la franca:

*Iam mi ignoris mian apudul',
Kiam ni ne estis samkredemuloj,
Nun ĉian bildon akceptas mia kor',
Ja ĝi estas herbejo por gazeloj,
Klostro por monaĥoj, templo por idol',
Kaaba por ĉirkaŭaj pilgrimantoj,
Ruloj de l' Tora, sanklibro de l' Koran',
Mia religio estas nur Amo,
Ĉien direktiĝas ties rajdobest'
Amo! mia religio kaj kredo.*

Ibn Arabi estis sufia mistikulo, filozofa, poeto, vojaĝanto kaj islama saĝulo el Al-Andalus. Liaj gravaj kontribuoj en diversaj fakoj de la islamaj sciencoj



donis al li la kromnomon “Viviganto de la Religio” kaj “La Plej Granda Doktoro”. Probable li estis la plej influa en la historio de islama mistikismo.

K O L O F O N O

La **Norda Kuriero** estas la informilo de la Nordfrancia Esperanto-Federacio. Ĝi eldoniĝas kvarfoje en jaro: januare, aprile, julie kaj oktobre.

Ĉefredaktas: **Katja Boen** kaj **Xavier Dewidehem**.

Enpaĝigas: Xavier Dewidehem.

Ni invitas la federacianojn kaj la klubestrojn sendi informojn, anoncojn, raportojn, artikolojn kaj fotojn al la *Norda Kuriero* per la jena adreso:

kuriero@esperanto-nord.org

ĝis la unua dimanĉo de januaro, aprilo, julio kaj oktobro.